

Cesestücke.

La fidela hundo.

Komercisto hejmen rajdante de foiro, survoje perdis sian valizon. Lia fidela pudelo, volante atentigi lin je tio, saltadis kvazaŭ furioze kontraŭ la ĉevalo. La komercisto opiniis, ke la hundo estas rabia, ekprenis pistolon kaj mortpafis ĝin. Baldaŭ li ekrimarkis la perdon de sia valizo. Li rajdis returnen kaj trovis la mortintan hundon kuŝantan sur lia valizo.

La homa korpo.

La homa korpo konsistas el la kapo, la torso kaj la membroj. La supra parto de l'kapo estas la kranio. Ambaŭflanke estas la tempioj kaj la oreloj. La antaŭa parto de l'kapo estas la vizaĝo. Ĝiaj partoj estas: la frunto, la okuloj kun la brovoj kaj okulharoj, la nazo, la buŝo kun la lipoj, la vangoj kaj la mentono.

Sub la kapo estas la kolo kun la nuko. Aliaj partoj de l'korpo estas, la brusto, la dorso, la ventro, la ŝultroj, kaj la koksoj.

La membroj estas: la brakoj kaj la kruroj. Ili konsistas el la supraj brakoj, la kubutoj, la malsupraj brakoj, la manoj, la supraj kruroj, la genuoj, la malsupraj kruroj (tibioj) la piedoj kaj la piedfingroj.

La kapelo.

Uhland.

Supre staras sur la monto
La silenta kapeleto,
En la valo ĉe la fonto,
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado
Nun eksonis tra l'silento, —
Haltis knabo en kantado
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l'monteto
El la valo ĉiu venos.
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,
Oni iam tien prenos.

Trad. L. L. Zamenhof.

Ermíto.

Princo tre memfida pri siaj beleco kaj riĉeco ĉasadis foje en soleca regiono de montegaro. Jen, li ekvidis maljunan ermiton, kiu sidis antaŭ sia ĉelo kaj serioze observis skeletan kranion. La princo iris al li kaj demandis kun moka rideto: „Kial vi rigardas tiel atente ĉi tiun kranion? Kion vi volas vidi sur ĝi?“ La ermito serioze rigardis la princon kaj respondis: „Mi volonte eltrovus, ĉu ĝi estas kranio de princo aŭ de almozulo. Sed neniamaniere mi povas konstati tion.“

La espero.

(Himno esperantista).

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero
Kolektiĝas pacaĵ batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l'homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

L. L. Zamenhof.

El Iliado.

(Tradukita de A. Kofman.)

Kantu, diino, koleron de la Peleido Aĥilo,
Ĝin, kiu al la Aĥajoj kaŭzis mizerojn sennombrajn
Kaj en Aidon dejetis multegajn animojn kuraĝajn
De herouloj kaj faris korpojn iliajn akiro
Al rabobirdoj kaj hundoj — fariĝis la volo de Zeŭso —
De tiu tago, de kiu disigis sin ekdisputinte
La ordonanto al viroj, Atrido, de l' dia Aĥilo.

Kia do dio ekscitis en ili disputon malpacan?
Filo Latona kaj Zeŭsa. Ekkolerigita de reĝo,
Li malsanigis la militistaron, — mortadis popoloj,
Ĉar malhonoris Atrido Ĥrizon, la pastron de l' dio.

den Hoffnung

*Auf dem feld in
die welt kann man
nimmer sein. dring die
v. feld in welt. auf
mit dem fliegen v. l.
stinkt
fliegen mit welt
in welt.*

*nigra ĝenerala
disputo*

in Tolk

Goethe. Ifigenio en Taŭrido.

(El germana lingvo tradukis Dro L. L. Zamenhof.)

Akto unua.

Sceno unua.

Ifigenio (sola). Al via ombro, pintoj moviĝemaj
 De l'densa kaj antikva arbareto,
 Al la sanktej' kvieta de l'diino
 Ankoraŭ nun kun trema sent' mi iras,
 Simile kiel la unuan fojon:
 Ne povas mi al vi al kutimiĝi.
 Jam multajn jarojn min ĉi tie kaŝas
 Plej alta volo, kiun mi obeas;
 Mi tamen ĉiam sentas min nur fremda.
 Ĉar ve! transmare estas miaj karaj!
 Mi longajn tagojn staras sur la bordo,
 Serĉante per la kor' la Grekan landon;
 Al miaj ĝemoj nur per surdaj tonoj
 Respondas la ondegoj de la maro.

El parolado de Dro. L. L. Zamenhof en la
 Unua universala kongreso esperantista.

(Boulogne-Sur-Mer 1905).

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj!

Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la
 granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj
 kaj malproksimaj, el la diversaj regnoj de la mondo, por frate
 premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo,
 kiu ĉiujn nin ligas

Ĝi kunvenis hodiaŭ, por montri al la mondo per faktoj
 nerefuteblaj tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni mon-
 tros al la mondo, ke reciproka komprenigado inter personoj de
 malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉio tio tute
 ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian, ke
 la muroj inter la popoloj tute ne estas io necesega, kaj eterna,
 ke reciproka komprenigado inter kreitaĵoj de tiu sama speco
 estas ne ia fantazia revo, sed apero tute natura, kiu pro tre be-
 daŭrindaj kaj hontindaj cirkonstancoj estis nur tre longe prokrastita,
 sed kiu pli aŭ malpli frue nepre devis veni kaj kiu fine nun venis,
 kiu nun elpaŝas, ankoraŭ tre malkuraĝe, sed, unu fojon ekirinte,

jam ne haltos kaj baldaŭ tiel potencege ekregos en la mondo, ke niaj nepoj eĉ ne volos kredi ke estis iam alie, ke la homoj, la reĝoj de la mondo, longan tempon ne komprenis unu alian. Ĉiu kiu diras, ke la parolaj organoj de ĉiuj popoloj estas malsamaj, ke ĉiu elparolas artan lingvon alie kaj la uzantoj de tia lingvo ne povas kompreni unu alian, venu al ni, kaj, se li estas honesta kaj ne volas konscie mensogi, li konfesos, ke li eraris. Li promenadu en la venontaj tagoj en la stratoj de Bulonjo-sur-Mar, li observadu, kiel bonege sin komprenas reciproke la reprezentantoj de la plej diversaj nacioj. Li demandu la renkontatajn Esperantistojn, kiom multe da tempo aŭ mono ĉiu el ili dediĉis por ellerni la artan lingvon, li komparu tion ĉi kun la grandegaj oferoj, kiujn postulas la lernado de ĉiu lingvo natura, — kaj, se li estas homo honesta, li iru en la mondon kaj ripetadu laŭte: „Jes, lingvo arta estas tute ebla, kaj la reciproka komprenigado de homoj per neŭtrala arta lingvo estas ne sole tute ebla ŝed eĉ tre kaj tre facila“

Hundo.

(El „J. Turgenev: Versaĵoj en prozo“. El la rusa lingvo tradukis Kabe.)

Ni sidas du en la ĉambro: mia hundo kaj mi. Ekstere muĝas terura ventego.

La hundo sidas antaŭ mi kaj rigardas rekte miajn okulojn.

Ankaŭ mi rigardas ĝiajn okulojn.

Ĝi kvazaŭ volas ion diri al mi. Ĝi estas muta, ĝi estas sen vortoj, ĝi ne komprenas sin mem, sed mi komprenas ĝin.

Mi komprenas, ke en ĉi tiu momento ĝin kaj min regas la sama sento, ke inter ni ekzistas neniua diferenco. Ni estas identaj; en ĉiu el ni brulas kaj lumas la sama tremanta flameto.

La morto alkuros, svingos per sia malvarma, larĝaflugilo . . .

— Kaj fino!

Kiu distingos poste, kia flameto brulis en ĉiu el ni?

Ne! Ne besto kaj homo interŝanĝas ĉi tie la rigardon . . .

La bluo de la ĉielo kaj la nuboj.

Knabo observis la nubojn kaj diris al sia patro: „Se ili nur ne kovrus la bluan ĉielon!“ La patro respondis al li: „Mia infano, la bluo de l'ĉielo estas ja bela kaj ĉarma, sed la grizaj nuboj donas al ni utilan pluvon“.

(Pestalozzi.)

El la antaŭparolo al Aus der Vorrede zum „Fundamento de Esperanto“^{*)}

Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu planan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estantaj, — estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla **Fundamento** de la lingvo. Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj planan sendangerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montrigos necesaj; sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta. . . .

Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la planan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante pliboniĝadi kaj perfektigiĝadi; la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektigado fariĝados ne per arbitra interbatala kaj ruiniga rompado kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera. . . .

Damit eine internationale Sprache gut und regelmäßig fortschreiten kann und damit sie volle Gewissheit habe, daß sie niemals auseinanderfällt und irgendein leichtsinniger Schritt ihrer künftigen Freunde nicht die Arbeiten ihrer gegenwärtigen Freunde zerstöre, ist vor allem eine Bedingung nötig: Die Existenz eines klar definierten, niemals anzutastenden Fundaments der Sprache. Wenn unsere Sprache offiziell von den Regierungen der Hauptstaaten angenommen sein wird, und diese Regierungen durch ein besonderes Gesetz dem Esperanto ein sicheres Leben und seine Verwendung sowie volle Gefahrlosigkeit gegen alle persönlichen Launen und Dispute garantieren, dann wird ein autoritatives Komitee, von diesen Regierungen unter gegenseitiger Verständigung gewählt, das Recht haben, in dem Fundament der Sprache ein für allemal alle gewünschten Abänderungen vorzunehmen, wenn solche Änderungen sich als notwendig erweisen; aber bis zu dieser Zeit muß das Fundament des Esperanto aufs strengste absolut unverändert bleiben, denn strikte Unantastbarkeit unseres Fundaments ist die wichtigste Ursache unseres bisherigen Fortschreitens und die wichtigste Bedingung für unser reguläres und friedliches zukünftiges Gedeihen.

Trotz der strengen Unantastbarkeit des Fundaments wird unsere Sprache die volle Möglichkeit haben, nicht nur sich ständig zu bereichern, sondern auch stetig zu verbessern und zu vervollkommen; die Unantastbarkeit des Fundaments wird uns nur immer garantieren, daß diese Vervollkommenung nicht durch willkürlichen, kriegerischen und ruinösen Bruch und Änderung, nicht durch Annullierung und Unbrauchbarmachung unserer bisherigen Literatur sondern auf natürlichem Wege ohne Verirrung und Gefahr erfolgt.

^{*)} Ins Deutsche übersezt von E. Winkelman.

La grilo kaj la najtingalo.

Fablo de G. E. Lessing.

„Mi asertas cin,“ diris la grilo al la najtingalo, „ke neniel mankas admirantoj de mia kanto.“ — „Nomu do ilin,“ diris la najtingalo. — „La laboremaj falĉistoj“ respondis la grilo „aŭskultas min kun granda plezuro, kaj ci certe ne neos, ke tiuj estas la plej utilaj personoj en la homa respubliko?“

„Tion mi ne volas nei,“ diris la najtingalo; „sed ci tial ne estu fiera pri ilia aplaŭdo. Al honestaj homoj, kiuj ĉiam kaj ĉiel pensas nur pri la laboro, certe mankas pli delikataj sentadoj. Ne imagu do pli frue ion pri cia kanto, ĝis lin ne aŭskultas kun ekstazo senzorga paŝtisto, kiu mem ludas tre ĉarme sian fluton.“

Trad. Sós.

La pentristo David kaj veturigisto.

David ekspoziciis unu el liaj plej belaj pentraĵoj. Foje li troviĝis hazarde en mezo de admirantaro. Li ekvidis tie viron, kiu estis laŭ lia kostumo veturigisto de fiakro kaj kies sinteno estis malŝatema. „Mi vidas, ke vi ne ŝatas tiun ĉi pentraĵon“, parolis al li la pentristo. — „Certe ne“. — „Tamen ĝi estas unu el tiuj, antaŭ kiuj haltas la tuta publiko“. — Ĝi ne valoras la penon. Jen la idiota pentristo, pentris ĉevalon kun buŝo tute kovrita de ŝaŭmo, kvankam ĝi ne havas en ĝi bridferon“. David eksilentis; tuj kiam la „Salon“ estis fermita, li forigis la ŝaŭmon.

(El franca lingvo: Sós).

Wörterverzeichnis

der in den Leseŝtücken vorkommenden Wörter, die in der Sprachlehre nicht enthalten sind.

akiri — erverben,	ĉarpenti — zimmern,	ekspozicio — Aus-
animo — Seele,	ĉelo — Zelle,	ŝtellung,
atingi — erreichen,	daŭri — dauern,	ekstazo — Ent-
bari — versperren,	deci — geziemen,	zückung,
batali — kämpfen,	dediĉi — widmen,	eterne — ewig,
beni — segnen,	distingi — auszeich-	fajli — feilen,
bordo — Ufer,	nen,	falĉi — mähen,
brido — Zaum,	dorso — Rücken,	fermi — schließen,
bruli — brennen,	dubi — zweifeln,	flamo — Flamme,
circonstanco — Um-	efektive — wirklich,	fluto — Flöte,
ŝtand,	eksciti — erregen,	foiro — Jahrmarkt,

fonto — Quelle,	mentono — Kinn,	ripozi — ruhen,
fosi — graben,	mezo — Mitte,	sango — Blut,
frunto — Stirn,	mizero — Elend,	senti — fühlen,
furioza — wütend,	mugi — brausen,	serioza — ernst,
genuo — Knie,	muta — stumm,	seruro — Schloß
gluti — schlucken,	najtingalo — Nach-	(3. schließen),
grava — wichtig,	tigall,	signo — Zeichen,
grilo — Grille,	nei — verneinen,	simila — ähnlich,
griza — grau,	nubo — Wolke,	soifi — dürsten,
gemi — seufzen,	nuko — Nacken,	sonori — klingen,
haki — hacken,	observi — beobachten,	songi — träumen
halti — halt machen,	obstina — eigensinnig,	sorto — Schicksal,
hazardo — Zufall,	ombro — Schatten,	speco — Gattung,
honesta — ehrlich,	ondo — Welle,	spirito — Geist,
humila — demütig,	paco — Friede,	sturno — Star
kolekti — sammeln,	peni — sich bemühen,	(Vogel),
kolo — Hals,	pentri — malen,	sukcesi — Erfolg
konfesi — bekennen,	perfekta — voll-	haben,
konscii — sich be-	kommen,	surda — taub,
wußt sein,	porti — tragen,	svingi — schwingen,
konsenti — einwil-	posteno — Posten,	sangi — wechseln,
ligen,	potenco — Macht,	saumo — Schaum,
konsisti — bestehen,	premi — drücken,	stipo — Klotz,
konverti — bekehren,	progresi — fort-	tempio — Schläfe,
korpo — Körper,	schreiten,	teni — halten,
kovri — verdecken,	prokrasti — auf-	tombo — Grab,
kranio — Schädel,	schieben,	torso — Stamm,
kreski — wachsen,	provizi — versehen,	traduki — übersetzen,
kubuto — Ellbogen,	pruvi — beweisen.	trulo — Relle,
kutimi — gewohnt	rabio — Tollwut,	valo — Tal,
sein,	raboti — hobeln,	valizo — Felleisen,
kvieta — sanft, ruhig,	rajdi — reiten,	valoro — Wert,
larga — breit,	refuti — zurückweisen,	veki — wecken,
ligi — binden,	regi — regieren,	ventro — Bauch,
manki — fehlen,	revi — träumen(wach),	vigla — munter,
masoni — mauern,	rilati — Bezug haben,	vipo — Peitsche,
membro — Glied,	ripeti — wiederholen,	vizaĝo — Gesicht,